
AKADEMIO INTERNACIA DE LA SCIENCOJ
(AIS) San Marino

Jura sidejo: Respubliko de San Marino, C.P. 111, RSM-47031 San Marino Città

P R O G R A M O

de la **2-a itala studadesio** lige al

DEKSEPA SANMARINA
UNIVERSITATA STUDADESIO

SUS 17

en Rimini / San Marino
1996.08.31 — 09.06 / 1695-1696 pFR

.....

Secónda italiana sessione universitaria assieme con la
diciassetèsima Sessione Universitaria Sanmarinese (SUS 17)
dell'Accademia Internazionale delle Scienze (AIS) San Marino

Zweite italienische Studientagung in Verbindung mit der
siebzehnten Sanmarinesischen Universitären Studientagung (SUS 17)
der Internationalen Akademie der Wissenschaften (AIS) San Marino

Second italian university session connected with the
seventeenth Sanmarinian University Session (SUS 17)
of the International Academy of Sciences (AIS) San Marino

Deuxième séance universitaire liée avec la
dix-septième Séance Universitaire Sanmarinienne (SUS 17)
de l'Académie Internationale des Sciences (AIS) San Marino

La laborlingvoj de la sesio estos ♦ Le lingue di lavoro sono ♦ Die Arbeitssprachen
sind ♦ The working languages will be ♦ Les langues de travail seront:

la Internacia Lingvo (ILO) ♦ e le lingue ethnice ufficiali dell' AIS ♦ und die
ethnischen offiziellen Sprache n der AIS ♦ and the ethnic official languages of AIS ♦
et les langues ethniques officielles de l'AIS:

Italiano — Deutsch — English — Français

Sekcioj kaj fakaroj de AIS

Kibernetiko (1. sekcio)

Fakaro 1.1: *Antropokibernetiko*

Fakoj: psikokibernetiko, lingvokibernetiko, klerigkibernetiko, kibernetikaj komunikada kaj dokumentada sciencoj, socikibernetiko, ekonomikibernetiko k.a.

Fakaro 1.2: *Ĝenerala kibernetiko*

Fakoj: teorio de informacio kaj kodigo, teorioj de algoritmoj, logikaj ŝaltretoj, abstraktaj aŭtomatoj kaj adaptivaj (celorientitaj) sistemoj, teoria informadiko, komputil-arkitekturo, ĝenerala teorio de retrokoplado kaj reguligo, teorio de strategiaj ludoj k.a.

Fakaro 1.3: *Inĝeniera kibernetiko*

Fakoj: (maŝina aŭ) inĝeniera kibernetiko (teknologioj de telekomunikado, de informstorado, de reguligo, de komputiloj kaj de aŭtomacio, aplikata informadiko k.a.)

Fakaro 1.4: *Biokibernetiko*

Fakoj: genetiko, neŭrofiziologio, teorio de retrokoplado en organismoj, kibernetika medicino, komunikado kaj konduto de bestoj k.a.

Humanistiko (2. sekcio)

Fakaro 2.1: *Bazaj neparametraj antroposciencoj*

Fakoj: neparametraj psikologio, lingvistiko, klerigscienco, komunikada kaj dokumentada sciencoj

Fakaro 2.2: *Soci-sciencoj neparametraj*

Fakoj: Neparametraj pedagogio, administraci-scienco, sociologio, ekonomiko, etnologio, jurscienco, politologio k.a.

Fakaro 2.3: *Artsciencoj neparametraj*

Fakoj: muzikologio kaj muzikhistorio, estetiko kaj historio de la porvidaj artoj, literaturscienco (speciale beletriko), estetiko kaj historio de la scenejaj artoj k.a.

Fakaro 2.4: *Integraj kultursciencoj*

Fakoj: etnologio, socigeografio, kulturgeografio, kompara religi-scienco, religihistorio, ekonomi-historio, ĝenerala historio, bibliotekscienco k.a.

Struktursciencoj (3. sekcio)

Fakaro 3.1: *Pensadstruktursciencoj*

Fakoj: simbola logiko, teorio de (precizaj, malprecizaj) aroj, ĝenerala aksiomatiko, aritmetiko, nombroteorio, probablokalkulo, matematika statistiko, matematikdidaktiko k.a.

Fakaro 3.2: *Imagadstruktursciencoj*

Fakoj: geometrio, kinematiko, ĝenerala sistemiko k.a.

Fakaro 3.3: *Formalaj matematikaj sciencoj*

Fakoj: algebro, teorio de serioj, funkcioj, ekvacioj, distribucioj ktp., kalkuloj de vektoroj, matricoj, diferencioj, integraloj, ĝenerala strukturteorio k.a.

Filozofio (4. sekcio)

Fakaro 4.1: *Filozofiaj bazosciencoj*

Fakoj: filozofia logiko, ontologio, semiotiko, ĝenerala modelteorio, epistemologio k.a.

Fakaro 4.2: *Filozofiaj valorteorioj*

Fakoj: filozofia estetiko, aksiologio, moralfilozofio, jurfilozofio, ŝtatfilozofio k.a.

Fakaro 4.3: *Metosciencoj*

Fakoj: historioj kaj filozofioj de la unuopaj sciencoj kaj sciencobranĉoj, idehistorio, historio de la filozofio, historio de la unuopaj sciencoj k.a.

Natursciencoj (5. sekcio)

Fakaro 5.1: *Substancikoj*

Fakoj: fiziko, fizikaj teknologioj (konstruktado, mekanika teknologio, elektroteknologio, maŝinkonstruado), kemio, kemiaj teknologioj.

Fakaro 5.2: *Mondikoj*

Fakoj: geosciencoj kaj astrosciencoj (astronomio, meteorologio, geodezio, naturgeografio, geologio, paleontologio k.a.)

Fakaro 5.3: *Biosciencoj*

Fakoj: ĝenerala biologio, biometrio, botaniko, zoologio, klasika (t.e. bio-)ekologio, humanbiologio, medicino, farmacio, nutradscienco k.a.

Morfosciencoj (6. sekcio) (teorioj kaj teknologioj de homa ĉirkaŭaĵo)

Fakaro 6.1: *Aŭdvidaj formkreado kaj dokumentado*

Fakoj: sonstudioteknologio, grafika teknologio, sportscienco, filmstudioteknologio, sciencaj fotado, filmado, surbendigo ktp., muzeologio, parolteknologio, retoriko k.a.

Fakaro 6.2: *Ilar-morfologio*

Fakoj: ergonomiko, formigo de industriaj produktoj, laborformteknologio, formigo de laborlokoj k.a.

Fakaro 6.3: *Mediplanado*

Fakoj: arkitekturo, ĝardenformigo, agronomio, urba kaj regia planadoj, trafikplanado, ĝeneraligita (homo-natur-)ekologio, turismiko k.a.

Programo de la 2-a itala studadsesio liga kun la 17-a Sanmarina Universitata Studadsesio de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino

Adreso de la sesiejo:

- plejgrandparte en la mezlernejo: Scuola Media 2, „Dante Alighieri“, Via Coletti 102, I-47037 Rimini tel. +39/5421-52082 (loĝkvartalo: San Giuliano Mare)
- en San Marino (Città), en la salono de la „Grand Hotel San Marino“

Stato: 1996-08-08/1695 pFR

I. MALFERMO, OFICIALAJ KUNSIDOJ KAJ FERMO

dato	tago	horo	okazaĵo	salono
08-31	lundo	19.30-20.00	ekzamenofico (membrokunsido)	
08-31	sabato	20.00-22.00	senatkunsidoj (nepublikaj)	
09-01	dimanĉo	difinota		
09-02	lundo	13.45-14.15	ekzamenofico (konsultoj)	Galilei
09-02	lundo	15.45-16.30	Asembleo de la Subtena Sektoro	¹
09-02	lundo	17.00-18.00	inaŭguro de la sesio	² Boulangier
09-03	mardo	20.00-20.30	sekcikunsidoj	sciigota
09-04	merkredo	20.30-22.00	Forumo pri Akademiaj Rekomendoj	sciigota
09-06	vendrede	ekde 10.00	kandidatprelegoj (ekzamenoj)	³ Boulangier
09-06	vendredo	16.00-17.00	22-a Ĝenerala Asembleo de la Scienca Sektoro	³ Boulangier
09-06	vendredo	17.00-18.00	solena fermo de la 17-a SUS	³ Boulangier

¹ en Rimini en la konstruaĵo de iama biblioteko (Viale C. Zavagli 73; enirejo de la preĝeja placeto, dekstre).

² en la aŭlo de la Universitato de Rimini, Via Angherá 22 (trovigaŭta en la 15-minuta pieddistanco de la kursejo).

³ en San Marino Città, en la halo de la „Grand Hotel San Marino“

II. SCIENCAJ KURSOJ KAJ PRELEGSERIOJ (po 1 stud-unuo, kun libervola finekzameno por enskribiĝintoj)

*La aliaj sube menciitaj sciencaj kursoj okazos ekde lundo ĝis ĵaŭdo
(02-05.09) po 2 instruhoraj tage en la samaj tempintervaloj.*

Kibernetiko (salono Schmidt)

- K01 OProf. Dr. habil. Helmar FRANK, Paderborn (D):
„Aplikadekzercoj de la klerigkibernetiko“, 9:00-11:00h
- K02 OProf. Dr. habil. Reinhard FÖSSMEIER, München (D):
„Elektitaj metodoj de komputilprogramado“, 11:00-13:00h

Humanistiko (salono Komenský)

- H01 OProf. Fabrizio PENNACHIETTI dr., Torino (I):
„La biblia rakonto de Suzana en literatur-historia konteksto“,
14:00-16:00h

Parton de la programo de la 2a sekcio konsistigas „Symposium Latinum“ (bv. rigardi la priskribon de la kadra programo).

Struktursciencoj (salono Euklides)

- S01 OProf. Horst. S. HOLDGRÜN dr., Göttingen (D):
„La programlingvo C“, 9:00-11:00h

Filozofio (salono Descartes)

- F01 AProf. Dr. Helmut ANGSTL, München (D):
„Praktiko. Demandoj pri agoteorio“, 11:00-13:00h

Natursciencoj (salono Galilei)

- N01 ADoc. Mag. Alicja LEWANDERSKA, Gliwice (PL),
kun enkonduko de OProf. Hans-Dietrich QUEDNAU, Freising (D):
„Apliko de naturkuracmetodoj antikvaj kaj novaj“, 11:00-13:00

Morfosciencoj (salono Gandhi)

- M01 OProf. Dr. habil. Tyburecusz TYBLEWSKI, Jelenia Góra (PL):
„Kiel plibonigi la rilatojn kun aliaj sammedianoj“, 9:00-11:00h

Resumoj de kelkaj SUS17 kursoj

„Aplikadekzercoj de la klerigkibernetiko“, (OProf. Dr. habil. Helmar Frank):
La klerigkibernetiko havas koheran fundamenton. Ĝin konstituas klerigsciencaj aplikoj de la informacipsikologio. Jam antaŭkibernetike tiel eblas ekspliki la lernkurbon kaj enkonduki la klerecinkrementon kiel mezuron de la laboro plenumita dum instrusituacio sen retrokoplado (lernstirado). La informacimezuro malrekte ebligas mezuri ankaŭ semantikan informacion kaj instruajinformacion — ĉi lastan

empirie, helpe de la divenmetodoj de Weltner. Kombinoj de la menciitaj rezultoj ebligas ekspliki la limon de la utileco de (perfekta) instrusituacia retrokoplado (lernregulado) kaj precizigila fenomenon de lerntransfero por elkalkuli la limojn de ĝia utileco. — En la kurso estos prezentataj la bazaj teoriaj kaj empiriaj rezultoj, kaj ekzercata la aplikado pere de kalkuligaj taskoj.

„Elektitaj metoderoj de komputilprogramado“,
(OProf. Dr. habil. Reinhard Fößmeier)

La programado de komputiloj, iam situanta inter sciencoj kaj artoj, evoluis al iom solida inĝenieriko. Tio signifas, ke fakulo pri programado bezonas teorian scion, sed ankaŭ aron da pli-malpli ĝeneralaj reguloj kaj teknikaj metodoj, por ke en la ĉiutaga li ne devu reinventi ĉion. La kurso montras elektitan aron el tiaj metoderoj. Ĝi ne povas celi superrigardon iel kompletan, sed volas per ekzemploj komprenigi, kiaspeca estas la scio bezonata de nuntempa profesia programisto. Aŭskultantoj ne bezonas informdikajn sciojn, sed havu elementan komprenon pri la funkciado de komputiloj kaj iom da teknika intereso.

„La programlingvo C“ (OProf. Horst. S. Holdgrün dr.)

Kvankam la komputila programlingvo C posedas nur malmulte da komandoj kaj tial facile estas memorigebla, ĝi tamen por komencanto prezentas certajn obstaklojn pro la riĉa ebleco ŝanĝi per la adresoj de la ĉefa memoro. Ŝajnas, ke la kreantoj de la lingvo provis realigi du certasene kontraŭdirajn ideojn: en la lingvo ne ekzistu superflua balasto, kiun oni nur malofte povas utiligi, kaj tamen je la dispono de programisto estu ĉiuj eblecoj, kiuj permesas kvazaŭ kiel per maŝina kodo stiri la ĉefan procezon. En la kurso oni provos montri al la aŭskultantoj, kiomgrade C sukcesas superi tiun kontraŭdiron. — Multaj komandoj konsistas cetere ne el vortoj, sed el nur unu aŭ du simboloj. Tio ebligas skribi je la unua vido kriptajn, ĉiukaze ege mallongajn kaj kompaktnajn programojn. Jen la fona ideo: programadu koncize! Eĉ la nomo de la lingvo signalas tion: C.

„Praktiko. Demandoj pri agoteorio“, (AProf. Dr. Helmut Angstl)

Grava branĉo de la hodiaŭa sciencoteorio estas agadteorio kaj la koncepto de agado kompreneble estas baza por praktika filozofio, precipe por etiko. Dum la kurso estos preparolataj kaj klarigotaj certaj — bezonataj por diskutado — nocioj: Evento, kaŭzeco, sinteno, volo, responso. Konoj pri logiko estos utilaj, sed ne nepre necesaj.

„Apliko de naturkuracmetodoj antikvaj kaj novaj“

(ADoc. Mag. Alicja Lewanderska / OProf. Hans-Dietrich Quednau)

Post mallonga resumo de diversaj formoj de naturkuracado estos prezentataj kelkaj praktikaj kuracrimedoj: Metodoj de Kneipp — konataj kiel akvokuracado kaj jam forgesitaj kiel vaporado, surverŝado, kompreskuracado kun rimadoj pri hardado kaj sana nutrado. Al unu grupo oni donos kuracadon per fingroj kaj manoj: BSM — pola metodo, adaptitaj mudroj de s-ino Stawowska, Ŝiatsu. Por volontuloj estos aplikebla la aromatia metodo kaj funel-kandeloj de Ho. Oni provos ankaŭ montri metodojn de d-ro Stolle kaj Manahan.

III. LIBERAJ PRELEGOJ

Humanistiko

- H-p1 ISKano Prof^{TS} Genadij ŜILO, Moskva (RUS):
„Nova familia juro de Rusio“
03.09 (mar.), 15:20-16:00, salono Descartes
- H-p2 Rektoro Prof. Dr.hab. J. CHRZAN, (PL):
„Situacio de universitatoj en Silezio“
04.09 (mer.), 14:00-14:40, salono Descartes
- H-p3 ISKanino Liana TUHVATULINA, Dmitrov (RUS):
„Esperanta jura terminaro. Nuntempo kaj perspektivoj.“
04.09 (mer.), 15:20-16:00, salono Descartes
- H-p4 Prof. Dr.hab. Henryk PRZYBYLSKI, Katowice (PL):
„Nova strukturo de studado en Pollando“
05.09 (ĵaŭ.), 14:40-15:20, salono Descartes

Struktursciencoj

- S-p1 OProf. Carlo MINNAJA, Padova (I):
„Aŭtomata tradukado en la Eŭropa Unio“
03.09 (mar.), 14:40-15:20, salono Euklides

Natursciencoj

- N-p1 ADoc. Wolfgang GÜNTHER dr.med., Ahnatal (D):
„Malsanoj de migrado“; 03.07 (mar.), 14:00-14:40, salono Galilei
- N-p2 ADoc. Werner FUSS, Garching (D):
„Lumkondukiloj — principo kaj aplikoj“
04.09 (mer.), 14:40-15:20, salono Galilei
- N-p3 ADoc. Mag. Alicja LEWANDERSKA, Gliwice (PL):
„Plantoj kaj arboj en folkora kredo kaj naturkuracado“
05.09 (ĵaŭ.), 14:00-14:40, salono Galilei

Morfosciencoj

- M-p1 ADoc. Dr. Maria BUTAN, Timisoara (RO):
„Elekti vojon“; 05.07 (ĵaŭ.), 15:20-16:00, salono Ghandi

IV. KANDIDATPRELEGOJ

La finekzameno por kandidatoj, kiuj celas per adapta adopto akiri ĉe AIS la agnoskon de sia akademia nivelo (bakalaŭreco, magistrecio, doktoreco aŭ habilit-doktoreco) okazos en antaŭtagmezo de la *6-a de septembro* (vendredo). La interkonsentitaj horoj kaj temoj estos afiŝitaj. La kandidatpreletoj estas publikaj. Skribaj

ekzamenoj (inkluzive la kursfinaj ekzamenetoj) okazos ĵaŭde. Buŝaj nepublikaj fakekzamenoj okazos laŭ interkonsento kun la ekzamenantoj.

La anoj de la ekzamenofico por la jaroj 1996–1999 (por unuopaj sekcioj) estos:

Direktoro de la ekzamenofico: OProf. Fabrizio Pennacchietti

Sekretario de la ekzamenofico: ADoc. Joanna Lewoc

sekcio 1 (Kibernetiko): OProf. Dr. habil. Reinhard Fößmeier
sekcio 2 (Humanistiko): AProf. Mag. Heinrich Dingeldein dr.
sekcio 3 (Struktursciencoj): OProf. Carlo Minnaja dr.
sekcio 4 (Filozofio): OProf. Kjell Sellin
sekcio 5 (Natursciencoj): OProf. Hans Michael Maitzen dr.
sekcio 6 (Morfosciencoj): OProf. Dr. habil. Tyburcjusz Tyblewski

V. KADRA PROGRAMO

Enkadre de la humanistika sekcio (la supera gvidanto: OProf. Fabrizio Pennacchietti dr.), paralele al la sciencaj kursoj (t.e. 2-6.09.1996), okazos Symposium Latinum (9-13h) kun la jenaj tagaj temoj (prelegoj okazos latinlingve):

02.09.1996: **De historia internationalitatis linguae Latinae**
(*Pri historio de internacieco de la Latina*)

04.09.1996: **Latinitas viva hodierna** (*Hodiaŭa viva Latina*)

05.09.1996: **De lingua Latina tamquam basi interlinguarum**
(*Pri la Latina iel bazo de interlingvoj*)

06.09.1996: **De futuris linguae Latinae** (*Pri estonteco de la Latina*)

Kursoj kaj kursfinaj ekzamenoj

La fakajn kursojn kaj prelegseriojn (po 8 studhorojn) dum SUS gvidas efektivaj membroj de AIS eventuale kunlabore kun adjunktoj de AIS. Enskribiĝintoj al la kurso rajtas postuli oficialan *ĉeestateston*, se ili ĉeestis minimume 3/4-jn (eventuale jam anticipe, se la sama kurso ankaŭ jam anticipe okazis), kaj noton, se ili partoprenis la kursfinan ekzameneton, kiu povas esti skribforma laŭ la metodo de elekt-respondoj aŭ eventuale de liberaj respondoj, se la respondo nur konsistas el nomoj aŭ nombroj, tiel ke la kompreno de ILo sufiĉas kaj propra esprimkapablo en ILo ne necesas.

Ankaŭ pri la *aŭdvidaj kursoj* ofertitaj el la instruteko povas okazi ekzamenetoj por kandidatoj, kiuj aŭ estis luprenintaj aŭ aĉetintaj la kurson, aŭ ĝin enskribiĝinte plejgrandparte sekvis dum SUS mem; ĉiukaze atesto nur validas kiel pruvilo de akirita studunuo, se la noto estas minimume 7/10.

Estas ebla senpaga senekzamena partopreno en la kursoj (necesas nur aliĝkotizo).

Necesas, ke la kandidato antaŭ ol finekzameniĝi estos enskribiĝinta al minimume 3 kursoj de SUS, inter kiuj:

- minimume unu devas esti el la sekcio, en kiu li kandidatiĝas;
- minimume unu devas esti el alia sekcio;
- maksimume unu de la tri devigaj kursoj povas esti ILo-kurso.

En almenaŭ unu kurso la kandidato devas partopreni la ekzameneton ricevante minimume la noton 6/10 (aŭ 7/10, se temas pri kurso el la instruteko). Eblas ripeti la kursfinan ekzameneton.

Por la fina ekzameno ne estas akceptebla kandidato, kiu neniun SUS-kurson plejgrandparte sekvis kaj per ekzameneto sukcese finis dum la SUS mem.

Pro la ĝis nun ne malofta prezentiĝado de kandidatoj al la fina ekzameno sen kompletigi kaj disponigi konforme al la ekzamenregularo ĉiujn necesajn erojn al la ekzamenoficejo, oni

! aŭ rifuzos, ke kandidato havigu mankantan eron nur post la publika fina ekzameno

! aŭ li pagos superantan la normalan ekzamenkotizon rekompencan pro la kromlaboro.

Por eviti tiajn malagrablajojn bv. ankoraŭ foje certiĝi, ĉu ĉiuj viaj necesaj por ekzameniĝo dokumentoj troviĝas ĉe la ekzamenoficejo !

Prelegoj

En ĉiu sekcio la plejmulto de la prelegoj estu en ILo. La partopreno je unuopaj prelegoj (kontraŭe al la partopreno en prelegserioj!) por kandidatoj ne egalvaloras al kurspartopreno. La prelegkunsidoj estas gvidataj de la dekanoj (aŭ vicdekanoj) de la koncerna sekcio aŭ ŝarĝitoj de ili.

♦ Okazontaj (ĉiuj en ILo) **debutprelegoj de novaj profesoroj kaj docentiĝ-prelegoj de estontaj plenrajtaj docentoj de AIS** ne daŭru pli longe ol po 45 (inkluzive diskuton kaj paŭzeton: 60) minutojn.

♦ La egala tempo estas je dispono por **invititaj prelegoj** en ajna oficiala lingvo de AIS kaj por **projektaceptigaj prelegoj** (en ILo) de kandidatoj, kiuj celas estontan *akiron* (ne: adopton) de titolo ĉe AIS.

♦ Ankaŭ de liberaj ISKanoj, t.e. de ISKanoj, kiuj ankoraŭ ne apartenas kiel adjunktoj aŭ efektivaj membroj al AIS, **liberaj prelegoj** estas akceptebla fare de la dekanoj de la koncerna sekcio. Liberaj prelegoj en ajna oficiala lingvo de AIS ne daŭru pli longe ol po 25, inkluzive diskuton kaj paŭzeton: 40 minutojn.

♦ Kromaj **koncizprelegoj** daŭros po 10–15 (inkluzive demandojn kaj paŭzeton: 20) minutojn en ajna oficiala lingvo de AIS. Ili estas ankoraŭ post la limdato por la starigo de la SUS-programo (eĉ surloke) ofertablaj al la (vic)dekanoj aŭ (vic) fakarestroj de la koncerna sekcio. Ĉiuj temoj de tiuj kromaj (t.e. en la programkajero ne surlistigitaj) koncizprelegoj estos bontempe afiŝataj dum SUS laŭ la indikoj de la prelegontoj.

**2-a itala studadsesio lige kun la
17-a Sanmarina Universitata Studadsesio (SUS 17)
en Rimini / San Marino**

1996.08.31 — 09.06 / 1695-1696 pFR

	sekcio / salono	9:00–11:00	11:00–13:00	14:00–16:00	vespere
SABATO 1996-08-31 /1695 pFR					ekzamenofico (membrokunsido, 19.30-20) senatkunsido (20-22)
DIMANĈO 1996-09-01 /1695 pFR					senatkunsido
LUNDO 1996-09-02 /1695 pFR	Boulanger 1 Schmidt 2 Komenský 3 Euklides 4 Descartes 5 Galilei 6 Gandhi	K 01 Frank Symposium Latinum S 01 Holdgrün M 01 Tyblewski	K 01 Föbmeier Symposium Latinum F 01 Angstl N 01 Lewand./Quednau	¹ Asembl./SubS (15.45-16.30) H 01 Pennacchiatti ekzamenofico (Galilei) (konsulth. 13.45-14.15)	² Inaŭguro de la sesio (17-18)

	sekcio / salono	9:00–11:00	11:00–13:00	14:00–16:00	vespere
MARDO 1996-09-03 /1696 pFR	1 Schmidt 2 Komenský 3 Euklides 4 Descartes 5 Galilei 6 Gandhi	K 01 Frank Symposium Latinum S 01 Holdgrün M 01 Tyblewski	K 01 Föbmeier Symposium Latinum F 01 Angstl N 01 Lewand./Quednau	H 01 Pennacchiatti / S-p1 / / / H-p1 N-p1 / /	
MERKREDO 1996-09-04 /1696 pFR	1 Schmidt 2 Komenský 3 Euklides 4 Descartes 5 Galilei 6 Gandhi	K 01 Frank Symposium Latinum S 01 Holdgrün M 01 Tyblewski	K 01 Föbmeier F 01 Angstl N 01 Lewand./Quednau	H 01 Pennacchiatti H-p2 / / H-p3 / N-p2 /	sekcikunsidoj (20-20.30) Forumo pri Akademaj Rekomendoj (20.30-22)
ĴAŬDO 1996-09-05 /1696 pFR	1 Schmidt 2 Komenský 3 Euklides 4 Descartes 5 Galilei 6 Gandhi	K 01 Frank Symposium Latinum S 01 Holdgrün M 01 Tyblewski	K 01 Föbmeier Symposium Latinum F 01 Angstl N 01 Lewand./Quednau	H 01 Pennacchiatti / H-p4 / N-p3 / / / / M-p1	
VENDREDO 1996-09-06 /1696 pFR	³ Boulanger 2 Komenský	Kandidatprelegoj (ekde la 10h) Symposium Latinum	Symposium Latinum		ĜA/SciS (16-17) Fermo (17-18)

¹ en Rimini en la konstruaĵo de iama biblioteko (Viale C. Zavagli 73; enirejo de la preĝeja placeto, dekstre).

² en la aŭlo de la universitato de Rimini. (15-minuta pieddistanco de la kursejo).

³ en San Marino Città, en la halo de la „Grand Hotel San Marino“ (salono Boulanger)

La salonoj estas nomitaj honore al la jenaj eminentaj personoj:

BOULANGER, George R. (1909–1982)

Fondinto (en 1957) de l'Association Internationale de Cybernétique (Namur, B) kaj ties prezidanto ĝis la morto; enkondukis en ĉi tiun asocion 1980 IĤon kiel trian laborlingvon, eklerninte ĝin kiel 70-jarulo; vicprezidanto de la Eŭropa Klubo kaj membro de ties iniciatgrupo AIS.

DESCARTES, René, latine: Renatus Cartesius, (1596–1650)

„La patro de moderna filozofio“, kiel oni ofte nomas lin, provis ligi filozofion al la natursciencoj aplikante por ambaŭ racian metodon. Li skizis principojn de planlingvo en letero de 1629–11–20 al la benediktana scienculo Mersenne.

EUKLEIDES de Aleksandrio (ĉ. 300 a.K.)

Greka matematikisto kaj naturesploristo, kiu laboris sub Ptolomeos I ĉe la „Museion“ en Aleksandrio. Lia plej fama verkaĵo estas la libro „Elementoj“, aksioma prezento de la tuta tiama geometrio kaj aritmetiko. Krome li verkis inter alie manualon „Geometria optiko“ kaj aliajn traktaĵojn pri planimetrio, sfero kaj matematika muzikteorio.

ĜALILEI, Galileo (1564–1642)

Kvankam liaj ideoj troviĝas kadre de la kristana mondkoncepto, la itallingva natursciencisto konfliktis kun la katolika eklezio pro sia verko pri la galaksi-modeloj, en kiu li argumentas por la nova, kies centro estas la suno. Kiel unu el la unuaj sciencistoj li verkis ne plu en la latina lingvo, nekomprenata de pli vasta publiko.

ĜANDHI, Mohandas Karamchand (1869–1948)

Hinda politikisto, kiu proklamis senarman rebelon kontraŭ la okupadaj trupoj, per manspinado kontraŭ la tekstilaj fabrikoj de Britio, per „salmarŝo“ kontraŭ la brita salmonopolo, per reiro al simpla natura vivoformo, por formi sendependan komunan ŝtaton de hinduoj kaj islamanoj. Li subtenis la ideon de la Internacia Lingvo, kunlaborante kun la svisa sciencisto Edmond Privat.

KOMENSKÝ, Jan A., latine: Johannes A. Comenius (1592–1670)

La fondinto de moderna pedagogio ne nur teorie, sed ankaŭ praktike kontribuis al sia fako, i.a. per facila lingvoinstrua legolibro. Li proponis la enkondukon de planlingvo kaj la starigon de internacia akademio de la sciencoj.

SCHMIDT, Hermann (1894–1968)

Jam en 1941 la germana fizikisto kaj reguladteknikisto prezentis la bazajn principojn de kibernetiko. Ekde ĉ. 1962 li pli kaj pli influis la filozofion de la klerkibernetiko kaj de aliaj antropokibernetikaj branĉoj.

Aliĝo

La aliĝkotizon, kiu ĝis la 27-a de julio estas 0,3 AKU = 37,50 DM, bv. pagi:

☞ al la AIS-konto: poŝtĝirokonto 2051-305 ĉe poŝtĝiro-oficejo Hannover (bank-kodo 25010030)

☞ aŭ ĉeke — senpere al la trezoristo: OProf. B.-A. Wickström, Institut für Finanzwissenschaften, Humboldt Universität, Spandauer Str. 1, 10178 Berlin (tiukaze, bv. *nepre aldoni minimume 0,12 AKU = 15,00 DM — aŭ egalvaloron — pro la bankkostoj.*)

kun nepra indiko: „*Aliĝo al la 17-a SUS de ...*“, aldonante majuskle Vian NOMON. **Post la 27-a de julio** (do ankaŭ dum la sesio mem) la aliĝkotizo estos 0,5 AKU (62,50 DM aŭ egalvaloro en aliaj devizoj).

Ankaŭ kursgvidontoj kaj prelegontoj pagu la aliĝkotizon laŭ art. 3.4 de la kotizregularo (la honorarioj pro la gviditaj kursoj, prelegoj kadre de prelegserioj aŭ por tiuj, kiuj estis akceptitaj por la antaŭe presita programo, eniros la servobonhavo de tiu partopreninto post la SUS-sesio).

Liberigitaj de la aliĝkotizo estas tiuj dumvivaj subtenaj membroj kaj la AIS-studentoj kun la valida studenta legitimilo (ili nepre indiku sian studentan numeron), kiuj aliĝas bontempe, t.e. minimume unu monaton antaŭ la okazigo de SUS aŭ alia studadsesio de AIS (alikaze krompagendas 0,2 AKU, anstataŭ 0,5 AKU).

La studenta legitimilo estas akirebla kontraŭ 0,5 AKU. Ĝi validas ĝis la atingo de la indikenda studadcelo, sed ne pli longe ol por 3 plenaj kalendaraj jaroj. Ĝi estas havebla ĉe la senata sekretario ADoc. Joanna Lewoc ankaŭ dum la sesio mem. Interesitoj bv. havigi al si antaŭe sian aktualan foton.

La aliĝo rajtigas:

☑ senpage partopreni ĉiujn kursojn, prelegseriojn, prelegojn (debut-, docentig-, gast-, konciz-, projektakceptigajn kaj liberajn prelegojn), ekzamenigojn kaj oficialaĵojn (la enskribiĝo al kursoj aŭ prelegserioj necesas nur tiam, se oni celas ĉeestad-ateston aŭ ekzamen-partoprenon pri ĝi); (*enskribiĝkotizo al unu kurso estas 0,3 AKU; ne ekzistas rabato por partoprenantoj el reformeŭropaj landoj*);

☑ ricevi la programkajeron kaj — fine de la sesio — partoprenantarliston;

☑ senpage partopreni ĉiujn erojn de la kadra programo, pri kiuj la programo ne indikas pagendan kromkotizon;

☑ ricevi propran insignon, kiu konfirmas la laŭregularan aliĝon.

Ĉiu aliĝo (do ankaŭ kurs-, preleg-anonco, kandidatiĝ-aliĝo) estas **pritraktebla nur post la alveno de aliĝkotizo!** Se la stato de Via servobonhavo ampleksas

necesan sumon, ne estas bezonata kroma ĝirado (ĝi estos aŭtomate deprenota);
bv. nur indiki tian pagmanieron sur Via aliĝilo!

Bonvolu atenti, ke la aliĝkotizo ne enhavas kostojn por adapta adopto
kaj kromaj ekzamenoj, tranokt-kostojn ktp.

Loĝado

Bv. memstare aranĝi Vian restadon (inkluzive mendon de la tranoktejoj). Kel-
kaj el la proksimaj al la ĉefa sesiejo hoteloj estas:

- Hotel „Amarcord“, Via Garattoni 27, tel. +39/541-21734
- Villa „De Anna“, Via C.Zavagli 94, tel. +39/541-25722
- Pensione „Villa Dina“, Via Gaerano Tonini 49, tel. +39/541-24355
- Hotel „Corazza“, Via Garattoni 15, tel. +39/541-21668
- Hotel „Marinarella“, Via Rinaldi 13, tel. +39/541-25970.

La kostoj por kompleta tag-pensio atingas mezume ĉe ĉiuj listigitaj hoteloj
60.000 italliroj; por unulitaj ĉambroj aldonendas kutime 5.000 italliroj tage. La
hoteloj estas bonkvalitaj. La distanco inter ili kaj la marbordo ne foras pli ol
duona kilometro.

La hoteloj/pensioj estas atingeblaj de la ĉefa stacidomo en Rimini per buso
n-ro 4 aŭ n-ro 8, kiuj veturas al la ĉefa sesiejo. De tie oni facile povas piediri
(ĉ. 500-700 metrojn) al la elektita loĝloko. La bileto aĉetblas ĉe la koncerna
budo aŭ ĉe la stacidoma kafejo (kosto ĉ. 1200-1300 italliroj); taksi-kosto tien
estas ĉ. 10.000-15.000 italliroj.

Vendrede, la 6-an de septembro, ĉiuj partoprenantoj de SUS povos verŝajne uzi
apartan buson de la Komunumo de Rimini por ĝustatempe atingi San Marinon
kaj por la vespera reveturo (bv. atenti la informtabulon en la kursejo). Se Vi
intencos memstare de Rimini atingi San Marinon, Vi povas uzi taksion (kosto
ĉ. 50.000-60.000 italliroj) aŭ buson (kursantaj ĉ. ĉiuhore; la bileto kostas ĉ.
8.000 LIT) de la stacidomo, troviĝanta ĉe la Placo L.Clementini. La busoj
kursas en ĉ. 1-horaj tempointervaloj; la unuaj busoj (ambaŭdirekten) ekveturas
ĉ. la 7a horo, la lastaj — ĉ. 20-a.

*Estas konsilinde anonci sin en ĉiuj hoteloj plej frue kiel eble por certigi
pri loĝebleco en antaŭvidata tempo.*

Mono

Kadre de AIS prezindikoj prefere okazu en „Akademiaj Kotiz-Unuoj“ (AKU);
1 AKU estas la laŭeble stabila jarkotizo de la Subtena Sektoro, t.e. momente
125,- DM. Subtenaj membroj same kiel ĉiuj membroj de Internacia Scienca

Kolegio (ISK), Internacia Arta Kolegio (IAK) kaj Internacia Teknika Kolegio
(ITK) de AIS havas, konforme al la regularo pri kotizoj kaj mastrumado, „ser-
vobonhavo“, t.e. AIS-konton, de kiu eblas

- senkoste ĝiri al aliaj individuaj AIS-kontoj aŭ pagi al AIS,
- je 3%-a kosto depreni dum SUS monon en DM aŭ en LIT kaj
- ĝiri al banka aŭ poŝta ĝirokontoj je 5%-a kosto (aŭ senkoste, se temas pri
pagendaj fakturoj por varoj aŭ servoj necesaj por agadi favore al celoj de AIS).

Honorarioj estas aŭtomate alkalkulataj al la servobonhavo, pagendaj aliĝ- kaj
membro-kotizoj estas aŭtomate dekalkulataj. Restadkosto dum SUS estas sur-
baze de fakturoj senkoste pageblaj el la servobonhavo de la partoprenanto, kiu
devas bontempe zorgi pri sufiĉa kontostato.

Ĉe la kongres-oficejo de SUS ne eblas ŝanĝi monon inter diversaj monistemoj!

SENATO KAJ SENATAJ OFICOJ 1996–1999

PREZIDANTO: OProf. Dr. habil. Helmar FRANK

Kleinenberger Weg 16, D-33100 Paderborn

tel.: +49/5251-163511; faknumero: +49/5251-163533

La prezidanton anstataŭas la vicprezidanto. La prezidanto:

- (1) kunordigas laboron de la senato,
- (2) gvidas la kunsidojn de la senato kaj de la Ĝenerala Asembleo,
- (3) enregistras kaj publikigas (kune kun la direktoro de la ekzamenofico) la agnoskitajn
sciencistajn gradojn kaj titolojn,
- (4) kontrolas (kune kun la vicprezidanto) la plenumitecon de la kondiĉoj por rangoplialtigo,
- (5) subskribas kaj stampas la dokumentojn pri alvoko aŭ agnosko de sciencista grado,
- (6) iniciatas kaj flegas novajn kontaktojn al eksteraj institucioj kaj elstaraj personecoj.

VICPREZIDANTO: OProf. Fabrizio PENNACCHIETTI dr.

Via delle Rosine, 10, I-10123 Torino

tel.: +39/11-8178242; faknumero: +39/11-8171053

retnumero: pennacch@rs950.cisi.unito.it

La vicprezidanto ne havas anstataŭanton (en la kazo de bezono transprenas liajn taskojn la
prezidanto). La vicprezidanto estas direktoro de la Scienca Sektoro (SciS) kaj estro de la
Internacia Scienca Kolegio (ISK). Krome li

- (1) kunordigas laboron de la dekanaro
- (2) akceptas (kune kun la prezidanto) novajn — komence liberajn — ISKanojn,
- (3) instigas kune kun la dekanoj al plenumo de kondiĉoj por rangoplialtigo,
- (4) kontrolas kune kun la dekanoj la enhavon de ISD,
- (5) proponas al la prezidanto legitimajn rango-plialtigojn de ISKanoj kaj
- (6) postulas protokoladon de sekcikunsidoj kaj elektadon de dekanoj kaj vicdekanoj.

SENATANO PRI FINANCOJ, DIREKTORO DE LA FINANCA OFICO

KAJ TREZORISTO: OProf. Bengt-Arne WICKSTRÖM dr.

Institut für Finanzwissenschaft, Humboldt Universität, Spandauer Str. 1,
D-10178 Berlin, tel.: +49/30-20935655, faksnúmero: +49/30-20935726
retnumero: wick@wiwi.hu-berlin.de

— *Vicdirektoro: OProf. Dr. habil. Helmar FRANK* —

La financofico

- (1) utiligas la AIS-kontojn,
- (2) kunlaboras kun la landaj aŭ regionaj sekcioj kaj asocioj pri financaj aferoj,
- (3) admonadas la pagon de pagendaj kotizoj,
- (4) varbadas novajn subtenajn membrojn,
- (5) faras kaj kontrolas investojn,
- (6) administras la fondusojn kaj pruntojn,
- (7) administras la servobonhavojn,
- (8) zorgas pri la librotenado,
- (9) starigas la spezokalkulon kaj la bilancon laŭeble ĝis la marto de la sekvanta jaro,
- (10) proponas al la ĜA la buĝeton por la sekvanta jaro kaj kontrolas ties plenumon,
- (11) proponas al la Asembleo de la Subtena Sektoro la AKU-valoron,
- (12) serĉadas novajn financajn rimedojn,
- (13) kunlaboras kun la revizoraro,
- (14) luprenas aŭ aĉetas buĝetkonforme laborlokojn (buroojn, kunvenejojn, instruejojn),
- (15) kontraktadas kun landaj sekcioj aŭ asocioj aŭ kun aliaj eksteraj (precipe: jure memstaraj) organizoj pri eventuala transprenado de havaĵoj kaj taskoj de AIS.

SENATANO PRI PROTOKOLADO, DIREKTORO DE LA PROTOKOLOFICO

KAJ SENATA SEKRETARIO: ADoc. Mag. Joanna LEWOC

Kleinenberger Weg 16 b, D-33100 Paderborn
tel.: +49/5251-16350, faksnúmero: +49/5251-163533
retnumero: blewo1@pbhrc.uni-paderborn.de

— *Vicdirektoro: OProf. Horst S. HOLDGRÜN dr.* —

Mathematisches Institut, Bunsenstr. 3-5, D-37073 Göttingen
tel.: +49/551-397764, faksnúmero: +49/551-392985
retnumero: holdgrun@uni-math.gwdg.de

La protokolofico

- (1) daŭrigas kaj konservas la protokolojn de la ĜA kaj de la senato,
- (2) zorgas pri la publikigado de ĉi tiuj protokoloj kaj de tiuj de la asembleo de SubS,
- (3) daŭrigas kaj konservas la registron de la studadsesioj de AIS (datoj, lokoj, kursoj),
- (4) starigas kune kun la dekanoj la SUS-programon,
- (5) administras kune kun la trezoristo la SUSojn,
- (6) transprenas la rutinan korespondadon.

SENATANO PRI EKZAMENOJ KAJ DIREKTORO DE LA EKZAMENOFICO:

OProf. Fabrizio PENNACCHIETTI dr.

Via delle Rosine, 10, I-10123 Torino
tel.: +39/11-8178242; faksnúmero: +39/11-8171053
retnumero: pennacch@rs950.cisi.unito.it

— *Vicdirektoro: OProf. Carlo MINNAJA dr.* —

La ekzamenofico

- (1) antraŭpritraktas kandidatiĝojn,
- (2) korespondas kun la kandidatoj kaj eventuale kun ekspertizantoj,
- (3) starigas la unuopajn ekzamenkomitatojn kune kun la koncernaj dekanoj,
- (4) organizas la ekzamenojn kune kun la koncernaj dekanoj,
- (5) zorgas pri la starigo kaj havigo de la atestoj, pri la enregistriĝo kaj pri la dokumentoj kaj
- (6) konservas la ekzamenaktojn.

SENATANO PRI LA AKADEMIA STRUKTURO KAJ DIREKTORO DE LA STRUKTUROFICO: OProf. Dr.habil. Tyburcysz TYBLEWSKI

ul. Bartka Zwyciezcy 11/1, PL-58-500 Jelenia Góra, tel.: +48/75-23112

— *Vicdirektoro: OProf. Hans Michael MAITZEN dr.* —

La strukturofico

- (1) observas la agadon de la regionaj kaj landaj asocioj, kolektante protokolojn ktp.,
- (2) kunordigas la kunlaboron de AIS kun landaj/regionaj asocioj en la filioj,
- (3) kontraktas pri klerigejoj de AIS kaj kontrolas la kontraktplenumadon,
- (4) prizorgas la Artan kaj Teknikan Sektorojn,
- (5) zorgas pri laŭbezona nomumado de (vic)dekanoj kaj fakar(vic)estroj kaj
- (6) administras aŭ administrigas lokajn instituciojn aŭ akademi-domojn.

SENATANO PRI STUDADO KAJ DIREKTORO DE LA KLERIGOFICO:

OProf. Hans-Dietrich QUEDNAU dr.

Forstwissenschaftliche Fakultät, Hohenbachernstr. 22
D-85354 Freising-Weißenstephan
tel.: +49/8161-714765, faksnúmero: +49/8186-714767
retnumero: quednau@cip.forst.uni-muenchen.de

— *Vicdirektoro: OProf. Dr. habil. Reinhard FÖSSMEIER* —

La klerigofico

- (1) daŭrigas la liston de la studentoj kaj donas studentajn legitimilojn,
- (2) prizorgas la instrutekon,
- (3) zorgas pri la plievoluigado de la studadplanoj de AIS,
- (4) zorgas kune kun la senatano pri protokolado pri la dokumentado de (SUSecaj kaj aliaj) studadsesioj kaj atestoj kaj
- (5) kontrolas kursojn kune realigataj en klerigejoj de AIS.

SENATANO PRI ESPLORADO KAJ EVOLUIGADO KAJ DIREKTORO DE LA SCIENCOFICO: OProf. Carlo MINNAJA dr.

Dipartimento di Matematica Pura ed Applicata, Via Belzoni 7, I-35131 Padova
tel.: +39/49-620198, faksnúmero: +39/49-8758596
retnumero: minnaja@pdm1.unipd.it

— *Vicdirektoro: OProf. Horst S. HOLDGRÜN dr.* —

La sciencofico

- (1) instigas al sciencaj kunlaborprojektoj sub la tegmento de AIS,
- (2) kontrolas la realigadon de tiaj kunlaborprojektoj,
- (3) konsilas pri ilia administradmaniero,
- (4) kontrolas ilian taŭgan dokumentadon kaj

- (5) reprezentas la akademion en la (kun-)okazigado de sciencaj konferencoj.
Dum la senata deĵorperiodo 1996-1999 la senatano pri esplorado kaj evoluigado flegadas krome
- (6) la kontakton de AIS al la registaraj instancoj de la Respubliko de San Marino.

SENATANO PRI PUBLIKAJ RILATOJ KAJ INFORMADO KAJ DIREKTORO DE LA INFORMOFICO: OProf. Dr.habil. Reinhard FÖSSMEIER

Dollmannstr. 19, D-81541 München 90
tel. kaj fakso: +49/89-6518661
retnumero: reinhard.foessmeier@ixos.de

— *Vicdirektoro: OProf. Hans Michael MAITZEN dr.habil.* —

La informofico

- (1) nomumas kontaktpersonon al la organizoj de la Esperanto-Movado (la kontakton al UEA flegadas dum la deĵorperiodo 1996-1999 vicdirektoro Maitzen),
- (2) zorgas pri la kontaktoj al eŭropaj kaj internaciaj institucioj,
- (3) zorgas pri la publikigo de ISD kaj de la AIS-regularoj (dum la deĵorperiodo 1996-1999 kunlabore kun la senatano pri akademia identeco),
- (4) propagandas verkaĵojn el AIS kaj la „Acta Sanmarinensia“
- (5) transprenas la informadon de la gazetaro,
- (6) kontrolas enhave kaj formale la „Acta Sanmarinensia“,
- (7) flegas la kontakton al Akademia Libroservo,
- (8) serĉadas alvokindajn scienculojn,
- (9) varbadas studentojn, kandidatojn kaj partoprenantojn por SUSoj kaj
- (10) zorgas pri la marketingo de AIS (oferto de AIS-aĵoj ktp.).

SENATANO PRI HONORADO KAJ DIREKTORO DE LA HONORADOFICO: OProf. Hans Michael MAITZEN dr.

Institut für Astronomie, Türkenschanzstr. 17, A-1180 Wien
tel.: +43/1-4706800-60, fakso: +43/1-470680015
retnumero: maitzen@astro.ast.univie.ac.at

— *Vicdirektoro: OProf.Dr.habil. Tyburejusz TYBLEWSKI* —

La honoradofico

- (1) pledas kaze de misuzado de titoloj aŭ de honoraj rajtoj,
- (2) proponadas honorindajn personojn,
- (3) preparas honorajn ceremoniojn,
- (4) prizorgas la solenajn malfermojn kaj fermojn de SUS,
- (5) zorgas pri aligoj al ArS kaj TeS,
- (6) prizorgas la Premion Pirlot,
- (7) prizorgas la decan memorigon de mortintoj en ISD kaj
- (8) zorgas pri digna interna komunikado kaj eksterna sinprezentado de AIS.

SENATANO PRI AKADEMIA IDENTECO KAJ DIREKTORO DE LA IDENTEC-OFICO: OProf. Dr. habil. Helmar FRANK

Kleinenberger Weg 16, D-33100 Paderborn
tel.: +49/5251-163511, fakso: +49/5251-163533

— *Vicdirektoro: OProf.Dr.habil. Tyburejusz TYBLEWSKI* —

La identecofico

- (1) enarkivigas la plenajn protokollibrojn,
- (2) dokumentadas la AIS-historion,
- (3) observadas la plenumadon de la regularoj kaj de decidoj,
- (4) zorgas pri flegado kaj aktualigo de AIS-tradicioj,
- (5) prizorgas la okazigon de la Akademia Forumo dum SUS kaj
- (6) zorgas pri la plievoluigo kaj prezentado de la rekomendoj kaj doktrino de AIS.

Invito al la Asembleo de la Subtena Sektoro

Plenumante la artikolon 16 de la Statuto, la artikolon 8.2 de la Apendico al la Statuto kaj la artikolon 9.3 (Organizaj regularoj por SUS) de la provizora Regularo pri la instruado kaj studado ĉe AIS mi kunvokas la Asembleon de la Subtena Sektoro de AIS al ties kunsido, kiu okazos lunde, **la 2-an de septembro 1996**, 15.30-16.30 en Rimini (salono Boulanger) en la konstruaĵo de iama biblioteko (Viale C. Zavagli 73; enirejo de la preĝeja placeto, dekstre).

Tagordo:

1. Formalaĵoj (ĉeestanteco, laborlingvoj, protokolo, tagordo, ĉeestrajto, kvorumeco).
2. Ĝenerala raporto.
3. Financa raporto; decido pri senŝarĝigo de la trezoristo.
4. Decidoj pri proponoj skribe alvenintaj plej malfrue 24 horojn anticipe.
5. Diversaĵoj.

Paderborn, 1996-08-08/1695pfR
La Direktoro:
ASci. Siegfried Piotrowski dr.

Invito al la Ĝenerala Asembleo

Plenumante la artikolon 8 de la Statuto, la artikolon 8.2 de la Apendico al la Statuto kaj la artikolon 9.4 (Organizaj regularoj por SUS) de la provizora Regularo pri la instruado kaj studado ĉe AIS mi kunvokas la Ĝeneralan Asembleon de la Scienca Sektoro de AIS al ties 22-a kunsido, kiu okazos vendrede, **la 6-an de septembro 1996**, 16.00-17.00h, en San Marino en la „Grand Hotel San Marino (salono Boulanger).

Tagordo:

1. Formalaĵoj (ĉeestanteco, protokolo, tagordo, ĉeestrajto, kvorumeco).
2. Ĝenerala raporto de la Senato.
3. Financa raporto, senŝarĝigo de la Senato 1991-1995, buĝeto.
4. Decidoj pri proponoj de la Senato kaj pri aliaj proponoj skribe alvenintaj plej malfrue 72 horojn anticipe kaj legeblaj en la SUS-akceptejo almenaŭ 24 horojn anticipe.
5. Kromaj tagordaj punktoj eventuale deciditaj dum la tagorda punkto 1.
6. Diversaĵoj.

Paderborn, 1996-08-08/1695pfR
La prezidanto: OProf. Dr. habil. H.Frank

Stato: 1996-08-08/1695pfR

EL LA OFERTOLISTO DE LA AKADEMIA LIBROSERVO:

- ✳ Reinhard SELTEN, Jonathan POOL
Enkonduko en la teorion de lingvaj ludoj (Ĉu mi lernu Esperanton?) 39,-
 Einführung in die Theorie sprachlicher Spiele (Soll ich Esperanto lernen?)
- Werner BORMANN, Helmar FRANK
Por plurlingveco de Eŭropo (Disputo pri argumentoj) 22,-
 Für Europas Mehrsprachigkeit (Ein Streit um Argumente)
- S. Piotrowski (eld.)
 Kybernetische Ursprünge der europäischen Bildungstechnologie 15,-
 Eŭropa Kalendaro 1997/1998; plurlingva eldono 10,-
- V. Barandovská-Frank (eld.) / J. Lánská (eld.)
Klerigkibernetiko / Kybernetische Pädagogik, vol. 6 kaj 7 po 69,-
 Kybernetische Pädagogik – Bildungsinformatik 1 u. 2, vol. 8 kaj 9 po 58,-
- M. Krause, S. Piotrowski (eld.)
 Bildungskybernetik und Europäische Kommunikation 24,-
- Jar-abono (kaj mendeblaj jarkolektoj ekde 1970) de la internacia revuo
 „Grundlagenstudien aus Kybernetik und Geisteswissenschaft“ (GrKG) 80,-
- H. Stachowiak
 Gedanken zur theologischen Kybernetik 9,-

Bv. aldoni la sendokostojn (3,- GM je libro)

Prezoj en GM

La distribuo de materialoj aŭ la afiŝado kie ajn tio povus kaŭzi la impreson de aprobo fare de AIS bezonas la antaŭan permeson de la (vic)prezidanto aŭ de la direktoro de la Subtena Sektoro. Ekzistos speciala afiŝejo por tia agado de SUS-anoj. Dum la sesio bv. sekvi la plej aktualajn sciigojn de la deĵoranta sekretariejo de la sesio afiŝotaj sur tiu ĉi informtabulo.

© Kopirajto: AIS. Ĉiuj eroj de ĉi-tiu programkajero estas libere represeblaj fare de ĉiuj.

Prezo de la programo: 0,02 AKU